

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2015



## Somera kurso en Turku, p. 6

- ♦ Inspire pri lingvoj: Poliglote en Berlino, p. 4
- ♦ Aŭtunaj Tagoj en Lahti, p. 10 ♦ Florados nun, p. 14

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.  
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.  
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.  
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.  
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.  
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)  
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*  
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ [robog@gmx.de](mailto:robog@gmx.de)  
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ [maj-lis@maisanjapa.info](mailto:maj-lis@maisanjapa.info)  
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 EUR/vuosi/år/jaro  
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**  
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
☎ 044 2642 742 ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.  
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.  
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300  
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Vivo, Foto: Robert Bogenschneider

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*  
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ [eafprezidanto@esperanto.fi](mailto:eafprezidanto@esperanto.fi)

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*  
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ [paivi.saarinen@iki.fi](mailto:paivi.saarinen@iki.fi)

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*  
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709, (02) 230 5319 ✉ [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi)

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**  
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ [robog@gmx.de](mailto:robog@gmx.de)  
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [tiina.kosunen945@gmail.com](mailto:tiina.kosunen945@gmail.com)  
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ [arja.kuhanen@netti.fi](mailto:arja.kuhanen@netti.fi)  
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com)

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**  
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)  
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi)  
*Tuomas Latva-Pirilä*, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 ✉ [tuomas.latva-pirila@suomi24.fi](mailto:tuomas.latva-pirila@suomi24.fi)

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*  
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [eafkasisto@esperanto.fi](mailto:eafkasisto@esperanto.fi)  
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**  
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)  
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.  
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Internet:** [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) ♦ [www.facebook.com/Finnlando](https://www.facebook.com/Finnlando) ♦ Twitter: @finnlando aŭ [twitter.com/#!/finnlando](https://twitter.com/#!/finnlando)

## Facile fondita registaro

**A**ntaŭ kvar jaroj la rubriko ĉi-paĝa estis mala. Tiam post la Finnlanda parlamenta baloto daŭris du monatojn pri-trakti por registaro. Estis formita registaro de ses partioj (el la ok en la parlamento), ideologie plej-eble diferencaj unuj de aliaj. Kiel atendeble, ĝiaj internaj kontraŭdiroj kaŭzis eksigon de du koalicianoj dum ĝia kvarjara periodo: Maldekstra Alianco en marto 2014 pro malkonsento pri ekonomia politiko, La Verdaj en septembro pro malkonsento pri plia nuklea energio. Sammonate la ĉefministro *Jyrki Katainen* estis nomumita vicprezidanto (pri dungado, ekonomia kresko, investado kaj konkurencopovo) de Eŭropa Komisiono kaj sekve forlasis la hejmlandon kaj ĝian registaron, kiu daŭrigis per minimuma parlamenta plimulto (102 el 200) kaj kun *Alexander Stubb* kiel ĉefministro ĝis nova baloto en aprilo ĉijara.

La rezulto estis surpriza – aŭ ne: multe gajnis Centra partio restinta opozicia (post okjara ĉefministreco kaj ega malgajno en la baloto de 2011) la antaŭan periodon, malgajnis Konservativa perdante sian pozicion kiel la plej granda parlamenta grupo kaj falante la tria – la dua laŭ grandeco fariĝis "La Finnjoj", kiel tiu populista kaj tre heterogena partio sin nomas eksterlande (en la finna "Bazaj", en la sveda "Veraj" finnoj), kvankam malgajnis unu seĝon. Antaŭ kvar jaroj la "Veraj" restigis sin ekster la registaro. Tiam la kerno en ilia balota kampanjo estis malaprobi la helpon de Eŭropa Unio al Portugalio kaj aliaj landoj en financa krizo, nun la sama pri Grekio. Duan fojon ili kolektis abundan, sed senanalizan popolan malkontenton. Socialdemokratoj unu-foje falis la kvara laŭ parlamenta forto. Ekster-tiuj kvar grandaj grupoj gajnis nur la verduloj.

La nova registaro enoficiĝis la 29-an de majo, apenaŭ monaton post la unua sesio de la nova parlamento. La traktado pri programo kaj elekta-do de kabineto do sukcesis en duona tempo

kompare kun tio en 2011. La proceduro estis rekta kaj senalternativa sub la gvido de inĝeniero *Juha Sipilä*, la prezidanto de Centro, fariĝinta ĉefministro. Regis konsento pri grandaj reduktioj de ŝtataj elspezoj. La celo estas malaltigo rekte buĝete kaj strukture je dek miliardoj da eŭroj ĝis la 2020-aj jaroj. Konkrete tio signifas ekzemple reduktion de 600 milionoj el edukado. En la listo de elspezigaj devoj de municipoj laŭplane forigitaj troviĝas ekzemple la leĝoj pri nedeviga instruado, pri bibliotekoj, pri muzeoj, pri sporto, pri kulturagado, pri teatroj kaj orkestroj kaj pri tagvartado (fruaĝa eduko) de infanoj. La ministro pri financoj fariĝis la prezidanto de Konservativa partio *Alexander Stubb*.

Pri Eŭropa Unio kaj eksterlandaj rilatoj estas konsento postuli striktan ekonomian kaj enmigradan politikon, ekzemple rifuzon de plia kvoto de rifuĝintoj. Subteno al evoluantaj landoj estas reduktata. Nur unu ŝtatekonomia sektoro restas netuŝita, la armeo. La ministro pri eksterlandaj aferoj fariĝis la prezidanto de "La Finnjoj" *Timo Soini*.

En la registara programo tute mankas lingvopolitiko. La sola aludo al lingvoj estas tio, ke estu fortigata instruado de la finna ĉe enmigrintoj kaj eksterlandaj studentoj. Pozitive certe estas, ke la programo antaŭvidas la gravecon de bona rilato inter popolgrupoj. Tamen, atentante opiniojn de kelkaj el la 14 ministroj, oni ne povas ne suspek-ti, ke iliaj ideoj pri internacia vivo kaj enlanda lingvopolitiko havas trajtojn fremdajn al la esperantista idearo.

Ŝtato havas civitanojn, Esperantujo homa-ranojn.



*Tuomo Grundström*

## Inspire pri lingvoj: Polyglot Gathering en Berlino

En la komenco de majo kolektiĝis proksimume 350 lingvolernemuloj el 52 landoj en Berlino por ĝui dum kvar tagoj la ĉi-jaran *Polyglot Gathering* (Poliglota Renkontiĝo).

La renkontiĝo okazis en hotelo-hostelo *A&O Berlin* situanta en nur unu-kilometra distanco de la ĉefstacidomo de Berlino. Pli facile atingeblan kongresejon oni apenaŭ povas imagi, kaj ĉar la ejo provizis al ni samtempe trankvilecojn, manĝejon kaj kongresajn salonojn, ankaŭ la renkontiĝo mem tre glate kaj praktike antaŭeniris.

La taga programo konsistis el kursoj, prelegoj kaj seminarioj pri lingvoj, lingvolernado, (sin)motivigo kaj la vivo de poliglotoj. Vespere ni povis ĝui la komunan kunestadon en pli libera etoso kun ludoj kaj aliaj leĝeraj programeroj. La temoj ofertis varian elekton da lingvoj, ofertante ankaŭ eksterkutimajn lingvojn kiel la hebrea, la norda samea kaj la indonezia. Simile la prelegoj okazis ne nur en la angla, sed ankaŭ en aliaj lingvoj, eĉ en facila Esperanto. Iuj prelegoj estis eĉ multlingvaj

tiel ke la preleganto komencis per iu lingvo, sekve daŭrigis per alia kaj finis en tria, aŭ eĉ en plia lingvo.

La renkontiĝon partoprenis multaj esperantistoj kaj ankaŭ la ĉeforganizantoj estis esperantistoj. Ŝajne pro tio la programo havis influon el Esperanto-aranĝoj. Ĉiutage okazis aligatorejoj (loko, kie oni parolas en iu ajna lingvo krom la angla kaj la gepatra lingvoj) kaj vespere okazis ekzemple multlingvaj gufujoj (tesalonoj kun bonetosa, intima babilado), dimanĉe multlingva koncerto de JoMo.

La etoso estis ege inspira kaj donis entuziasmon progresi en la lingvokononj. Aŭdi pri spertoj, motivigmanieroj kaj konsiloj tre helpis trovi la propran manieron lerni la aferojn. Certe ne ĉagrenas ankaŭ la renkonto de ĉarmaj kaj simpataj homoj. Tiuj estas la plej gravaj rezultoj de la kongreso.

Legu pli ĉe [www.polyglotberlin.com](http://www.polyglotberlin.com) kaj estu bonvena partopreni venontjare!

*Paula Niinikorpi*

## Interreta TV-elsendo pri la Malfermo de la UK en Lille, Francio

La unuan fojon en la historio de la Esperantomovado estos eble spekti la solenan malfermon de la Universala Kongreso de Esperanto per interreto.

LKK de la UK provos filmi kaj interrete elsendi la solenan eventon. Ĉar tia elsendo okazos la unuan fojon kaj mankas ankoraŭ spertoj pri la realigo, povas aperi diversaj teknikaj problemoj – kvankam oni kompreneble klopodas solvi kaj eviti ilin.

La rekta adreso por spektado estos dissendata per retroŝto al la dezirantoj, kiuj registras sian retadreson ĉe la paĝo <http://blog-bilinguisme.fr/produits/uk2015malfermo/>

La solena inaŭguro de la Universala Kongreso komenciĝos je la 10-a horo la 26-an de julio – Detalaj informoj pri la UK estas troveblaj ĉe <http://uea.org/kongresoj/>

*L. Szilvási / Ret-Info*

# Invito al la 35-a Internacia Esperanto-Sumoo

Ekde la 5-a de julio 2015 ĝis la 14-a (10 tagoj, ĉar julio estas tre okupita monato por esperantistoj) okazos la 35-a Internacia Esperanto-Sumoo. Ĉu vi ne legos libron kun esperantistoj en la tuta mondo? Por detala informo, legu: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Okaze de tiuj konkursoj mi organizas Esperanto-sumoon. En la lasta Sumoo en majo partoprenis 196 homoj el 26 landoj kaj ili entute legis 15 000 paĝojn.

## 1. Celoj:

1. Altigi legkapablon de esperantistoj.
2. Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo

## 2. Luktmanniero:

1. Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
2. Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago.

3. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj, vi akiros unu venkon en tiu tago, se ne – malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi luktas ne kontraŭ aliaj luktitistoj, sed kontraŭ vi mem.

**3. Aliĝo:** Sendu jenajn informojn al HORI Jasuo: [horizonto@water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@water.sannet.ne.jp)

1. Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso, via luktista nomo
2. Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kvanto da paĝoj, kiujn vi legos por unu tago

## 4. Raportu vian rezulton

Kiam komenciĝos la Sumoo, ĉiun duan aŭ trian tagon (ne nepre) raportu al la prizorgantoj pri venko aŭ malvenko.

Al perfektaj venkintoj kun 15 venkoj ni donos diplomon.

*HORI Jasuo (s-ro)  
371-0825 Japanio, Gunma,  
Maebasi, Ootone 2-13-3  
horizonto@water.sannet.ne.jp*

# Vizito antaŭ 50 jaroj

Estimataj,

antaŭ 50 jaroj en majo 1965 faris dektagan viziton en la lernejo de *Rauvola* apud Turku en Finnlando la pola instruistino *Stefania Palica* el *Szczecin* en Pollando kun du knabinetoj flue parolantaj en Esperanto, 12-jara *Bojena* kaj 10-jara *Damuta Oginska*. En la finna lernejo kunigitaj klasoj 5&6 studadis Esperanton dum kvar lecionoj semajne. Infanoj senpene komunikis per la Zamenhofa lingvo. Dudeko da gazetoj

raportis pri la tiutempe rara interŝanĝo de lernantoj. Redaktoro *Andrzej Petty* intervjuis la instruistinon Palica en Varsovio por Pola Radio. Kelkaj lernantoj, nun jam iomete pli ol 60-jaraj, tre bone ankoraŭ memoras la neforgeseblan renkontiĝon. Indas ripeti jene: "Pasintaj tagoj ne revenas, sed memoras ni!"

*Nostalgie rakontis Jorma Ahomäki*

# Esperanton kesäkurssi Turussa – Somera kurso en Turku 4.–7.6.2015

En la ĉi-somera esperantokurso de EAF en la Civitana Instituto de Aurala en Turku partoprenis entute 14 kursanoj kaj krome multaj vizitantoj. La plejparto de la kursanoj estis el la regiono de Turku, la aliaj estis el la tuta Finnlando, el Kuopio, Kouvola, Helsinki, Espoo, Hyvinkää kaj Tampere. Nia eksterlandana kursano, s-ro Filipo, venis el Londono, sed estas irlandano.

Nian instruiston Patrik akompanis lia edzino, la francdevena Alia. La etoso de la kurso estis internacia kaj afabla. La kursanoj studis diligente sub gvidado de Patrik. Li uzis en la instruado materialon de sia nova lernolibro, kiu verŝajne aperos venontjare. La kursanoj diskutis multe kaj faris diversajn skribajn ekzercojn.

Dum la libertempo estis en la progra-



Somera kursodiskuto. Fotoj: TO.

mo konatiĝo en Turku kun esperantlingvaj ĉiĉeronoj. La kursanoj vizitis i.a. la katedralon, du muzeojn kaj konatiĝis kun la ĉefbiblioteko por informiĝi, kie tie troviĝas esperantlingvaj verkoj kaj gazetoj. Venontjare ni havos la someran kurson en Iisalmi, Gražina Opulskienė el Litovio jam promesis veni tiam.

La gazetara komuniko rezultigis almenaŭ unu artikoleon: Ābo Underrättelser raportis 2.6. pri aranĝado de la kurso.

Jen kursospertoj de du kursanoj, *Eeva* kaj *Leena*. Koran dankon al ĉiuj kursanoj kaj vizitantoj! Ĝis la en Iisalmi!



Partoprenantoj de la somera kurso.

*Tiina Oittinen*

## Interesaj temoj

Mi multe ŝatis la esperantan kurson en la Civitana Instituto de Aurala. Ĝi estis organizita de energi plena kursorespondeculo Tiina Oittinen kaj helpanta instruisto Paula Harju.

Patrik Austin bonege instruis nin. Li uzis komputilan metodon. La lecionoj estis bazitaj en liaj baldaŭ publiĝotaj du lernolibroj pri Esperanto (la unua por komencantoj kaj la dua por progresantoj).

Patrik ankaŭ kuraĝigis nin interparoli pri variaj, interesaj temoj. Alia, lia ĉarma edzino helpis nin en praktikaj aferoj.

*Philip Fahey* el Irlando partoprenis la kurson. Lia irlanda akĉento komence konfuzis min, sed baldaŭ mi alkutimiĝis kaj komprenis lian paroladon en Esperanto.

Estis plezuro ke esperantfamulinoj *Raiita Pyhälä*, *Sylvia Hämäläinen* kaj *Paula Niinikorpi* vizitis nin. Ili havis interesajn lingvajn vidpunktojn, kiuj stimulis la konversacion. Granda ĝojo estis ke la esperantoveterano *Jorma Ahomäki* en la lasta kursotago vizitis kaj kafumis kun ni.

Unu parto de nia kurso estis vizitoj en kelkaj muzeoj de Turku. Leena Tiusanen kaj Tiina Oittinen esperantlingve ĉiĉeronis kaj mi admiris iliajn vastajn sciojn pri la historio. Vespere ni vizitis restoraciojn, en kiuj ni ĝuis bongustajn manĝaĵojn kaj havis amuzan esperantlingvan babiladon.

En la fino de la kurso *Päivi Saarinen* alportis esperantlingvajn librojn por aĉeti kaj donacis nome de EAF al la kursanoj esperantlingvajn *Kalevala*-librojn.

*Dankema lernantino  
Eeva Nikoskelainen*

## Moderna tekniko

Turku kiel urbo kun multaj muzeoj kaj vidindaĵoj plaĉas al mi kaj mi volonte veturis tien. Por mi taŭgis bone ankaŭ la tempo de la

kurso: ne tro proksime al BET aŭ UK, tiel eblas partopreno al ĉiuj tri.

Nia instruisto Patrik donis al ni tekstojn pri diversaj temoj kun konversaciaj ekzercoj. Precipe utila por mi estis ekz. "komputile", ĉar tiajn terminojn oni ne trovas en la vortaro. Ni ripetis bazan gramatikon, kio ankaŭ helpis plivastigi mian vortrezoron. La moderna tekniko funkciis sen problemoj: Patrik tajpis sian klavaron, kaj ni vidis la tekston sur la blanka muro.

Sed Patrik ne estas nur instruisto, sed ankaŭ muzikisto. Kune ni kantis kun lia gitara akompano. Speciale mi ĝuis la vivantan muzikon dimanĉe, kiam ankaŭ Tiina alportis sian violonon.

La kultura programo de la kurso estis interesa. Dum la tagaj ekskursoj ni vizitis la katedralon, urban bibliotekon, apotekan kaj artan muzeojn, kaj aŭdis interesajn rakontojn Esperante, kiam ni promenis ambaŭflanke de la rivero Aura. Koran dankon al niaj lertaj gvidistoj Leena kaj Tiina!

Tranoktante surŝipe en s/s Borea eblis pruvi la bonan funkcion de la urba busa reto. Dank' al ĝia vasto ni kun Merja vizitis la belan urbeton *Naantali* antaŭ la komenco de la kurso. Nia kursorespondeculo Tiina estas denove dankinda pro bone funkciaj aranĝaĵoj. Ni povas nur diveni, kiel multe ŝi bezonis labori, por ke ĉio fluis tiel facile. La tutan kurson partoprenis dek gekursanoj, sed ni havis ankaŭ partempajn kursanojn kaj vizitantojn, kiuj ĉeestis unu aŭ du tagojn. Estas ĉiam inspire renkonti aliajn Esperantistojn. Ĉifoje ni havis nur unu partoprenanton, kiu ne parolis la finnan lingvon.

Ankoraŭfoje koran dankon pro ĉio al Patrik, Tiina, Leena kaj ĉiuj, kiuj helpis al la sukceso de la kurso. La etoso estis tutan tempon tre bona, kaj agrabla surprizo estis, ke ni ĉiuj ricevis esperantlingvan *Kalevala*-libron por la fermo de la kurso. Mi tre aprezas la donacon.

*Leena Lindqvist  
el Kuopio*

## Eldonejo en Prago

Antaŭ kelkaj jaroj mi havis eblecon viziti Pragon. Ĝi estas tre alloga kaj altira celo por vojaĝemuloj el la tuta mondo. Unikaj libroj raportas pri la historio de tiu ĉi turisma perlo ĉe la rivero *Vltava*. Raraĵo por esperantistoj estas *Praha Gvidlibro* eldonita en la jaro 1957. Ĝi estas riĉe ilustrita per fotoj kaj desegnaĵoj. La urbo tre olaĉis al mi. Tamen vera surprizo estis ekkoni la movadan aktivulon *Petr Chrdle*, kiu posedas kaj estras la eldonejon *Kava-Pech* fonditan en la 1992-a jaro. Pri detaloj rigardu *www.kava-peč.cz/esperanto*.

Tuj mian atenton kaptis la tre konata 700-paĝa bele bindita verko *Švejk* de *Jaroslav Hašek*. Temas pri aventuroj de la brava soldato *Švejk* dum la mondmilito. La ilustraĵojn realigis *Josef Lada*. Tre flue kuras la traduko de *Vladimir Vána*. Avide legantaj okuloj sekvas linion post linio senlace. Streĉa, kolora kaj bonhumora rakonto pozitive kaj forte katenas literaturamantojn. Trista animstato, se tia estas, dum legado rapide forvaporiga. Tio estas senduba fakto. Efike subtenas la okulojn de veteranaj civitanoj taŭga litertipo. Pro tio mi esprimas mian kontenton.

La luksa kaj bela **Biblio** estas eldonita 2006 en 4 000 ekzempleroj. Pro speciale maldika papero la verko ne estas briksimila. La Malnova Testamento estas tradukita de d-ro Zamenhof. En etnaj lingvoj oni ofte retradukas la bibliajn tekstojn. La interpretaĵo de Zamenhof tre bone eltenis la forpason de tempo. Jen vi ha-

vas prestiĝan verkon por montri ankaŭ al eks-termovaduloj.

Petro Chrdle rekomendis varme la mondfaman dramon **R.U.R.** (Rossumaj Universalaj Robotoj) de *Karel Čapek* (1890–1938). Ĝi jam atingis sian duan eldonon Esperantan en la jaro 2014. En la verko la unuan fojon estis uzita la termino "robot" por artefarita inteligenta homsimila estaĵo, kiu sekve disvastiĝis en preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo. La verko, kvankam verkita komence de la pasinta jarcento en la jaro 1920, estas eĉ hodiaŭ ege aktuala. *Miroslava Tomečková* desegnis la ilustraĵojn por R.U.R. En la plej freŝa Esperanta eldono estas artikolo pri la prezentaĵoj de la dramo sursceneje. La bele bindita libro havas artisman eksteran aspekton.

Ni havas bonan eblecon konatiĝi kun la Esperantaj libroj publikigitaj en Prago. Petro Chrdle, la mastro de *Kava-Pech*, gvidos nin talente. La menciitaj tri verkoj aperis en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento de UEA. Parenteze indas menci, ke en la jaro 2014 aperis ankaŭ en la finna lingvo brilega biografio de la forpasinta prezidento *Václav Havel*. Verkis ĝin origine en la angla la konata diplomato *Michael Zantovský*. Recenzoj estis tre favoraj tutmonde. Komencu aventuron en la lando de heroo sportemulo *Emil Zátopek*, admirata nun ankoraŭ de malnova generacio en Finnlando.

*Bonan literaturan apetiton.  
Jorma Ahomäki*

## Interŝanĝo de poŝtmarkoj

Germana esperantisto ŝatus interŝanĝi finnajn kaj germanajn stampitajn poŝtmarkojn laŭ cer-

ta maniero. Se interesus vin tia korespondado, la redaktoro (*robog@gmx.de*) peros la adreson.



## Interesa trovaĵo

Foliumante iun malnovan libron mi trovis ankoraŭ pli malnovan gazeteltondaĵon. Ĝi estis eltondita el iu germana gazeto nomita *Das Echo* (La eĥo), aŭ eventuale povas esti iu vorto inter tiuj du vortoj. La gazeto estas redaktita en Berlino kaj datita la 13-an de septembro **1906**. Ĝi tiam aperis jam la 25-an jaron kaj ĝi estis la numero 1 254. Do la gazeto estis fondita jam en 1881 (kiel *Aamulehti* en Tampere).

Kial la eltondaĵo estis konservita? Estas Esperanta kolumno 25 cm-jn longa, 8 cm-jn larĝa sur ĝi. Plej supre estas Esperanta anekdoto kun traduko en la germanan. Ĝi esta prenita el Fundamenta Krestomatio, la anekdoto "Kurioza Trompo". La traduko aperas sub ĉiu Esperanta linio, printita ete kiel "muŝa fekaĵo". La leganto devis havi bonajn okulojn aŭ tre bonan lupeon.

Sekve estas la titolo "Internacia Korespondado Esperanta". Tri germanaj sinjoroj deziris korespondi: la unua volis korespondi kun francoj pri komercaj aferoj kaj la dua kun alilandanoj pri ĉiaj temoj, precipe pri la lernejeco. La tria volis interŝanĝi leterojn kun amerikaj negocaj homoj kaj kun esperantistoj de ĉiuj landoj pri persona libereco, precipe "libera amo".

La lasta alineo estas germanlingva novaĵo el la dua UK en Ĝenevo, kiun oni en la teksto nomas svisgermane *Genf*. Jen la novaĵo tradukita: "La Esperantokongreso en Genf estis granda sukceso. Ĉie sur la ĉapeloj aŭ surtutoj de la gastoj oni vidis la verdan koloron, ĉar ĝi estas la signo de la Esperanto-frataro. Dro Zamenhof estis la kongresa prezidanto. 1500 delegitoj el la plej diversaj Esperanto-societoj ĉeestis."

*Sylvia Hämäläinen*

## Lanĉiĝis la 2-a Muzika Konkurso de la revuo Kontakto

Post la pasintjara, unua sukcesa realigo la revuo *Kontakto*, TEJO kun apogo de UEA relanĉas la 2-an Muzikan Konkurson de Kontakto. La celo estas pleniĝi la truan, kiun kaŭzis la forlaso de la branĉo "Muziko" el la Belartaj Konkursoj de UEA kaj premii la talentojn de niaj artistoj. Ĉi-jare la konkurso estas dividita en tri kategorioj: Kanto de la Jaro, Premio de la publiko kaj Nova Talento.

La regularo estis aktualigita por ĉi tiu 2-a konkurso. La premio "Albumo de la jaro" es-

tis anstataŭigita per la premio "Nova Talento", kiu premias la plej bonan kantaĵon de artisto neniam antaŭe lanĉinta albumon kaj neniam antaŭe ricevinta premion en tiu ĉi konkurso.

En 2014 partoprenis 16 konkursaĵoj el konataj kaj novtalentaj artistoj. La premiojn ricevis *La Perdita Generacio kaj Barok'*.

Pliaj detaloj pri partopreno, reguloj kaj aliĝilo troviĝas ĉe [kontakto.tejo.org](http://kontakto.tejo.org) kaj demandoj rilataj al la konkurso estas bonvenaj per retroŝto al la adreso [muzikakonkurso@tejo.org](mailto:muzikakonkurso@tejo.org).

*Laŭ anonco ĉe kontakto.tejo.org*

# Aŭtunaj Tagoj en Lahti – Syyspäivät Lahdessa 12.–13.9.2015

## Programo – Ohjelma (ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

### SABATO, 12.9. / LAUANTAI

**11.00** Alveno al Lahti. *Saapuminen Lahteen.*

**11.30** Malfermo de la Tagoj en la hotelo *Kauppahotelli Grand*. Ebleco lasi valizojn en la hotelo. *Päivien avaus Kauppahotelli Grandin aulassa. Mahdollisuus jättää matkatavarat hotellin säilytykseen.*

**12.30-13.30** Komuna promeno al la renovigita vendoplaco de Lahti. Proprakoste lunĉo en iu manĝejo en la urba centro.

*Yhteiskävely Lahden uudistetulle torille. Omakustanteinen lounas torin läheisyydessä.*

**13.30-16.00** Piediro el la vendoplaco, komence vizito en la Historia Muzeo. Survoje al la haveno eblas viziti LANU-skulpturparkon (sur deklivo) kaj en la haveno Sibeliusdomon, Pro Puu k.a. vidindaĵojn. Fine kafo en havena kafejo (proprakoste). Reveno al la hotelo eblas kun urba buso (bileto 3,40 EUR)

*Kävely Lahden torilta, ensin Historialliselle museolle, sitten jatketaan satamaan. Matkan varrella mahdollisuus käydä LANU-veistospuistossa (puisto sijaitsee rinteessä), satamassa on Sibelius-talo, Pro Puu ja muita nähtävyyksiä. Lopuksi kahvit satamakahvilassa (omakustanteisesti). Paluu hotelliin on mahdollista myös paikallisbussilla (lippu 3,40 EUR)*

**16.00–17.00** Paŭzo. *Tauko.*

**17.00–18.30** Koncerto de Timo Väänänen, Kristiina Ilmonen ja Anna-Kaisa Liedes en Kalevi Aho-salono de Lahden musikiopisto (apud la hotelo). *Timo Väänänen, Kristiina Ilmonen ja Anna-Kaisa Liedes konsertoivat Lah-*

*den musiikkiopiston Kalevi Aho -salissa.*

**19.00–** Vespermanĝo proprakoste laŭ mendoj en la hotelo. *Illallinen omakustanteisesti tilausten mukaan Kauppahotelli Grandissa.*

### DIMANĈO, 13.9. / SUNNUNTAI

**8.00–9.30** Matenmanĝo. *Aamiainen.*

**9.30** Ekiro al la tuttaga ekskurso en Orimattila, gvidas Börje Eriksson. *Lähtö kokopäiväretkelle Orimattilaan Börje Erikssonin opastukselle.*

Survoje ni vidos lokajn vidindaĵojn kaj haltos por vizito en la arkivo de eks-prezidento Urho Kekkonen (UKK). *Matkalla nähdään mm: Hennalan kasarmialue ja Porvoonjoen historiallinen alkupää-alue sekä käydään UKK-arkistossa.*

Post la arkivo ni iros al Tapolan kyläyhteisö, la vilaĝeto por homoj kun specialaj bezonoj. Ni konatiĝos kun la komunumo kaj lunĉos tie ĉ. je la 12a.

*UKK-arkiston jälkeen vierailaan Tapolan kyläyhteisössä, jossa tutustutaan yhteisöön ja syödään lounasta noin klo 12.*

El Tapola veturo al la Kulturcentro de Orimattila. Publika informado kaj diskuto pri Esperanto. Kafo kun fermo de la Tagoj. *Tapolasta ajo Orimattilan kulttuurikeskukseen. Julkinen tiedotus ja keskustelu esperantosta. Kahvit ja päivien päätös.*

**15.00** Reveno al Lahti. Bone atingeblaj trajnoj kaj busoj kiuj ekveturas ĉ. la 16a horo. *Paluu bussilla Lahteen, ehditään klo 16.00 aikoihin lähteviin juniin tai busseihin.*

Espreble vi ĉiuj jam notis en viajn kalendarojn la datojn de Aŭtunaj Tagoj en Lahti! Nin atendas multflanka, multkultura kaj treege interesa semajnfino, kies bonan etoson kreos ni ĉiuj kune. Kiel ofte eblas ĉeesti en tiel altnivela koncerto de la internacie konataj artistoj, kiu atendos nin en la Muzikinstituto de Lahti. Timo Väänänen (kantelo) ludos en la ensemblo *Suunta* (Direkto) kun *Kristiina Ilmonen* (blov- kaj perkutinstrumentoj) kaj *Anna-Kaisa Liedes* (kanto). Ĉiuj estas nacie kaj internacie konataj artistoj de la finna popola muziko kaj tradicia kaj nova. Timo estas pinta kantelisto de la lando, kiu scipovas ankaŭ nian lingvon. Ili koncertos en Lahti speciale por ni kaj nature ankaŭ al ĉiuj aliaj. Do, indas rekomendi al konatuloj kaj geamikoj (la koncerta programo kostos nur 10 EUR).

Sabate antaŭ la koncerto ni konatiĝos en la urbo Lahti kun lokaj esperantistoj. Vespere

en la komuna vespermanĝo ni povos tuj post la koncerto interŝanĝi spertojn kaj opiniojn. Kaj dimanĉe ni havos pliajn spertojn dum la ekskurso al *Orimattila* sub la gvido de *Börje Eriksson*. Kiuj el vi jam vizitis la arkivon de nia eks-prezidento *Urho Kaleva Kekkonen*? Nun estos tio en la programo. Poste okazos interesa vizito en vilaĝa komunumo Tapola. En la kultura centro de Orimattila ni havos okazaĵon de publika informado kaj diskuto pri Esperanto. Post kafumado ni revenos al Lahti denove riĉaj je spertoj.

*Liiton syyspäivät ovat tälläkin kertaa täynnä elämyksiä ja kokemuksia. Johan päivämäärät ovat kalenterissasi. Meitä odottaa nimittäin ainutlaatuinen konsertti Lahden musiikkiopiston Kalevi Aho -salissa. Suomen huippukanneltaja Timo Väänänen Suunta-yhtyeen kanssa on lupautunut konsertoimaan erityisesti meille; toki*



## ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF  
12.–13.9.2015 en Lahti.

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Tel./Ret-adreso: \_\_\_\_\_

**Aliĝkotizo** (enhavas koncerton kaj muzean viziton sabate):

25 EUR ..... ĝis 15.8.2015 \_\_\_\_\_

30 EUR ..... post 15.8.2015 \_\_\_\_\_

15 EUR por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub

15 jaroj sen aliĝkotizo

**AT-PAKETO 1** kun tranoktado en hotelo Kauppahotelli Grand (inkl. 1 nokton en 2-lita ĉambro kaj ekskurso dimanĉe) **SUMO 90 EUR:** \_\_\_\_\_  
krompagoj: 1-lita ĉambro 30 EUR/nokto, dua tranoktado en la hotelo 40 EUR/persono/2-lita

**AT-PAKETO 2** sen tranoktado (inkl. ekskurso dimanĉe) **SUMO 50 EUR:** \_\_\_\_\_

Lunĉo sabate (10–20 EUR): \_\_\_\_\_  
(pago surloke, aliĝo por rezervado de lokoj)

Kafo sabate (6–12 EUR): \_\_\_\_\_  
(pago surloke, aliĝo por rezervado de lokoj)

Vespermanĝo sabate (30–40 EUR): \_\_\_\_\_  
(pago surloke, aliĝo por rezervado de lokoj)

**Entute pagenda al la konto de EAF:** \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto:

FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH

Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

**Pliaj informoj, deziroj aŭ demandoj** (eblas sendi rekte al la kontaktuloj):

**Bonvolu sendi la aliĝilon al:**

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

BONVENON!



*konsertti on avoin kaikille muillekin. Ohjelma maksaa vain 10 EUR joten sitä kannattaa suositella ystäville ja tuttaville.*



**Suunta. Kristiina Ilmonen, Anna-Kaisa Liedes ja Timo Väänänen**

*Suunta-yhtyeessä soittavat Timon kanssa Kristiina Ilmonen (puhaltimet, ääni, lyömäsoittimet) ja Anna-Kaisa Liedes (laulu). Kaikki ovat Suomen eturivin kansanmusiikin soittajia ja Sibelius-akatemian opettajia. Ja kai tiesitte, että Timo osaa myös esperantoa sujuvas-*

*ti. Lauantaina tutustumme paikallisten esperantistien kanssa Lahteen ja illalla konsertin elämysten jälkeen meitä odottaa yhteinen illallinen. Sunnuntain retki vie meidät Orimattilan suuntaan, jossa on paljon koettavaa ja nähtävää Börje Erikssonin johdolla. Käymme mm. UKK-arkistossa ja vierailemme Tapolan kyläyhteisössä. Retken lopuksi on Orimattilan kulttuurikeskuksessa kaikille avoin informaatio ja keskustelutilaisuus esperantosta. Kahvittelemme jälkeen palaamme Lahteen, josta monta kokemusta rikkaampina lähdemme kukin kotia kohti.*

*Elkore bonvenon en Lahti! Sydämellisesti tervetuloa Lahteen!*

*Loka Esperanto-grupo kaj estraro de EAF. Paikallinen esperantoryhmä ja liiton hallitus.*

**ILMOITTAUTUMISLOMAKE**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 12.–13.9.2015 Lahdessa.

Nimi:

Osoite:

Puh./sähköposti:

**Ilmoittautumismaksu** (sis. konsertin ja museokäynnin lauantaina):

25 EUR ..... 15.8.2015 asti \_\_\_\_\_

30 EUR ..... 15.8.2015 jälkeen \_\_\_\_\_

15 EUR FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman mak-  
sua alle 15-vuotiaat.

**AT-PAKETTI 1** yöpyminen Kauppahotelli Grandissa (sis. 1 yön 2-h. huoneessa ja retken sunn.) **90 EUR:** \_\_\_\_\_  
lisämaksut: 1-hengen huone 30 EUR/yö;  
lisäyö 40 EUR/henk./2-hh

**AT-PAKETTI 2** ilman majoitusta (sis. retken sunnuntai-  
na) **50 EUR:** \_\_\_\_\_

Lounas lauantaina (10–20 EUR): \_\_\_\_\_

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

Kahvi lauantaina (6–12 EUR): \_\_\_\_\_

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

Illallinen lauantaina (30–40 EUR): \_\_\_\_\_

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

**Maksut yhteensä**

**Suomen Esperantoliiton tilille:** \_\_\_\_\_

**Tilinumero:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

**Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä**

(voit lähettää myös suoraan yhteyshenkilöille):

**Lähetä lomake osoitteella:**

Suomen Esperantoliitto,

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**TERVETULOA!**



## Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu aliĝi sendante per poŝto la aliĝilon al la oficejo de EAF en Helsinki aŭ sendu la aliĝon retpoŝte al la adreso *eafmendoj@esperanto.fi*. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la **referencnumeron 4640** sen iuj aliaj tekstoj. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj sciu, kiu volas kion dum la AT. Tre gravas aliĝo al la komunaj manĝoj.

Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al la sekretario de EAF, Tiina Oittinen, kaj al Börje Eriksson, estrarano el la regiono de Lahti. La kasisto de EAF, Tiina Kosunen, prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj. Iliaj kontaktingformoj estas sur paĝo 2.

Bonvolu sekvi la informojn sur la retpaĝoj *www.esperanto.fi*

## Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi* sekä maksa osallistumismaksu liiton tilille. Muista käyttää **viitenumeroa 4640**, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös tiedot siitä, mihin olet tulossa mukaan. Esim. yhteiset ruokailut lauantaan tilaamme ilmoitusten mukaan.

Erlailisiin tiedusteluihin vastaavat liiton sihteeri Tiina Oittinen ja Lahden seudulla asuva hallituksen jäsen Börje Eriksson. Liiton rahastonhoitaja Tiina Kosunen huolehtii maksujen kirjaamisesta ja kokoaa ilmoittautumistiedot. Kaikkien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.

Tietoja päivistä on myös nettisivuillamme *www.esperanto.fi*, seuraa tiedotusta siellä.

# El la jarlibro de UEA de la jaro 1967

Hazarde mi komencis foliumi la Jarlibron de UEA por la jaro 1967. Estis interesa la scio kiom da delegitoj EAF tiam havis kompare kun la kvanto de membroj. Mi ne scias, ĉu UEA tiam havis asociajn membrojn, aŭ ĉu oni kalkulis nur la individuajn membrojn. Mi preskaŭ kredas, ke temas pri nur individuaj membroj. Min ankaŭ mirigis, ke *Harri Laine*, kiu en -67 estis asocia sekretario-kasisto, ankoraŭ partoprenas en la aktivado.

EAF. La prezidanto estis rektoro *Irja Kle-mola* kaj la sekretario-kasisto Harri Laine. En 1967 en la asocio estis 170 membroj. La ĉefdelegito en Finnlando (Suomio) estis *Joel Vilkki* el Somero kaj ĉie en la lando estis anoncitaj 109 personoj kiel delegitoj D, vic- VD,

fak- FD aŭ junaj delegitoj JD. Ĉar kelkaj personoj estis fakdelegitoj de pli ol unu fako, la tuta nombro estis 145. En Helsinki estis 22, en Tampere 6 kaj en Turku 12 D-j, VD-j, JD-j aŭ FD-j.

En 1967 la prezidanto de UEA estis prof. d-ro *Ivo Lapenna*, la ĝenerala sekretario *Günt-her Becker*, la finna komitatano *V.J. Kostiainen* el Hämeenlinna kaj la direktorino de la Centra oficejo f-ino *M.H. Vermaas*. La membrototizo (MA) estis 25 gld, kio en finnaj markoj estis 25 mk (ĉ. 4,2 EUR). La Universala Kongreso ne okazis en Tel-Aviv (Israelo) kiel planite, sed en Rotterdamo pro la 7-taga milito.

*Sylvia Hämäläinen*

## Jo joutui - Den blomstertid - Florados nun

Osallistuin kesäkuussa publiikkiin, tutkintojen julkistusjuhlaan, Suomen kansainvälisimmässä korkeakoulussa, Taideyliopiston Sibelius-Akatemiassa. Neljä tohtoria ja lukuisa joukko maistereita ja kandidaatteja otti vastaan todistuksensa. Eivät kaikki olleet paikalla, mutta kaikki siihen mennessä vuoden aikana valmistuneet mainittiin ja kaikki saivat suosionosoitukset.

Dekaani Tuomas Auvinen piti puheensa yliopiston virallisilla kielillä, suomeksi ja ruotsiksi. Muutamin lausein hän täydensi apukielellä, englanniksi.

Musiikkiohjelma, puheet ja todistustenjako päättyi perinteiseen koulutapaan Suvivirteen, jonka kolme ensimmäistä säkeistöä oli painettu ohjelmalehteen molemmilla kotimaisilla kielillä.

Suvivirsi on kansansävelmä, sen runoilija on Israel Kolmodin (1694, uudistanut Johan Olof Wallin 1819) ja nykyinen suomennos on vuoden 1937 virsikirjakomitean versio.

Suvivirsi on suomenmaalaisten, entisten ja uusien, yhteistä kulttuuriperintöä.

Tämä on yhteiskunta- ja kielipoliittinen kannanotto. Hyvän kesän toivotukseksi vieressä on Suvivirren esperantoversio, kääntäjä Åke Ahlrén (1965).

*Tuomo Grundström*



Florados nun la tero kun granda bel' kaj ben'.  
Vi venas, ho somero, ekĝermas herb' kaj gren'.  
Pro varma sun-radio jam cedis frost-steril'.  
Kun ĝoj' vigliĝas ĉio al renaskiĝ-jubil'.

Herbejaj flor-bukedoj, kampara nobla gren',  
la riĉaj ĝarden-bedoj kaj arba verdo-plen'.  
Jen signoj al memoro pri l' vasta Dia bon'  
kaj Lia grac-favoro en ĉiu jar-sezon'.

Aŭdiĝas birdoj trile kun mult-varia son'.  
Do kantu ni simile al la ĉiela tron'!  
Animo, gloru Dion, ĝoj-kantu Lin sen lim'.  
Li donas al ni ĉion por korpo kaj anim'.

## Seulo gastigos la 102-an UK

La ĉefurbo de la Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okaziĝo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario *Martin Schaffer* kaj la Konstanta Kongresa

Sekretario *Clay Magalhães*, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj.

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1.776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare; el 52 al 112.

*laŭ GK 575*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)  
[jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:jukka.pietilainen@helsinki.fi) (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530  
☒ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202  
☒ [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi),  
[www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☒ [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu)  
[aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Carola Antskog) Hedbergsvägen 3 B, 25700 Kimito ☒ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)
- Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☒ [ww.esperanto.fi/tampere](http://ww.esperanto.fi/tampere) (Markus Sunela: [markus.sunela@iki.fi](mailto:markus.sunela@iki.fi))  
☎ 040 7685 165)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☒ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)  
☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☒ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
☒ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☒ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

# 2015

Nro	Limdato	Aperas
4/2015	1.9.	en septembro
5/2015	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 EUR	1/1 sivu/paĝo 50 EUR
1/2 sivua/paĝo 60 EUR	1/2 sivua/paĝo 30 EUR
1/4 sivua/paĝo 40 EUR	1/4 sivua/paĝo 20 EUR

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:  
[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

## Esperanto-societo Antaŭen informas

- 07.09. je la 17.00 Septembra vespero
- 09.09. je la 11.30 Esperanto-klubo de Antaŭen
- 05.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 09.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 23.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 14.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun estraranon vi renkontas en Nesto, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17. Bv. vidi pliajn informojn ĉe la retejo [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere)

Someraj renkontiĝoj okazas en la kafejo de la ĉefbiblioteko ”Metso” en Tampere lunde je la 17–18 (ĝis la 31-a de aŭgusto). Bonvenon!

*Estraro*



En Sibeliushall, fotis RB

## Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 31.8.2015 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 31.8.2015 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.